



LA INFORMILO

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

ELDONISTO: ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCO

EDITEUR: Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto

Maison des Jeunes et de la Culture
27, rue de la République, 54000 - NANCY - Fr.

PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
2^{ème} trim. 1978
n° 22



abonnement
un an: 10F
UNU JARO: 10 F
(8 INTERN. KUPON.)

TO★FLASH... ESPERANTO★FLASH... ESPERANTO★FL

UNE MOTION EXEMPLAIRE !

CONSEIL GENERAL DE LA MOSELLE
3ème session extraordinaire
1977

CONSEIL GÉNÉRAL DE LA MOSELLE
RÉSOLUTION ADOPTÉE

le 18 JAN. 1978

Le Secrétaire Général Administratif :

MOTION

Les membres du Conseil Général de la Moselle, réunis en 3ème session extraordinaire de 1977, le 18 janvier 1978,

CONSIDÉRANT:

- Que les relations internationales, de plus en plus favorisées par les progrès de la technique moderne et des moyens de communication, sont devenues une réalité quotidienne, et montrent, de toute évidence que le rapprochement physique des peuples est un fait accompli,
- Que chaque peuple désire conserver sa propre culture, qui est son identité, et que la diversité de celles-ci constitue la richesse du monde et la valeur de la vie.
- Qu'une véritable entente et une solide union, notamment en Europe, ne peuvent être établies que sur une mutuelle compréhension dont dépendent le bonheur et l'existence même des peuples, à travers la paix du monde,
- Qu'ainsi l'Europe et le monde ont de plus en plus besoin d'une langue de communication au niveau mondial, que cette langue ne peut être aucune des langues nationales pour des raisons politiques, économiques et culturelles,
- Que le multilinguisme dans les relations internationales est une source, souvent d'erreur, et toujours de dépenses considérables.

- Que depuis plus d'un demi-siècle, la langue internationale Espéranto a fait, dans tous les domaines, ses preuves de clarté, de précision et de facilité. Répandue sur les cinq continents, elle compte des millions d'utilisateurs, parmi lesquels des personnalités de premier plan dans les domaines de la politique, des sciences et de la culture. Qu'elle prouve ainsi être parfaitement apte à remplir ce rôle de langue mondiale auxiliaire neutre,
- Que l'UNESCO a voté une résolution favorable à l'usage de l'espéranto et a reçu de cinq états d'Europe une demande officielle pour que l'utilisation de la langue internationale espéranto soit étudiée,
- Que plus de 225 députés français ont fait connaître leur volonté que la langue internationale espéranto soit considérée dès maintenant, comme indispensable à la coopération des peuples d'Europe,
- Que des résultats encourageants sont acquis depuis l'introduction de la langue internationale espéranto, comme matière à option, dans les Facultés des Lettres de CLERMONT-FERRAND depuis 1969, d'AIX-en-PROVENCE depuis 1970, et dans plus de trente Universités dans le monde,
- Que plusieurs expériences dans le monde ont prouvé que la structure de la Langue Internationale espéranto préparait et facilitait la compréhension lors de l'enseignement des autres langues,
- Qu'une proposition de loi -sous le n° 1667- a été déposée par plus de cent députés devant l'Assemblée Nationale, tendant à inclure la langue internationale espéranto, dans l'Enseignement Secondaire comme langue facultative,

DEMANDENT,

à Monsieur le Ministre de l'Education, que la proposition de loi n°1667 soit soumise à la Commission Culturelle et présentée au vote de Messieurs les Députés.

RAPPORT SUR LES CONTACTS AVEC LES CANDIDATS AUX ELECTIONS A L'ASSEMBLEE NATIONALE de MARS 1978

Au cours de la période électorale, un certain nombre d'espérantistes, répondant à l'appel du Président GONIN, ont demandé aux candidats députés de leur circonscription de leur faire connaître leur position au sujet de la généralisation de la Langue Internationale dans le monde et de son enseignement officiel.

Il y a lieu de citer en particulier :

— l'avis de Mme SAUNIER-SEITE, qui précise : « Je puis vous assurer que je suis entièrement disposée à appuyer vos efforts de façon à rendre possible le choix de la Langue Internationale au baccalauréat, ainsi qu'à tenter d'instaurer une licence d'enseignement de l'Espéranto en France. »

— la position de M. Haby (ancien ministre de l'Education) : « Mon département a pris des dispositions pour que des cours d'Espéranto puissent être donnés dans les établissements publics secondaires, dans le cadre des activités socio-éducatives... Le caractère artificiel de cette langue et l'absence d'un support culturel ne permettent cependant pas d'envisager son insertion dans les horaires des classes des collèges et lycées et partant son inscription comme épreuve d'examen. »

— le groupe des députés socialistes qui affirme son accord puisque la proposition de loi n° 1667 a été déposée par lui en 1975 à l'Assemblée nationale.

— du groupe des députés communistes : « Le choix des langues vivantes figure dans l'éventail de nos options ; l'enseignement de l'Espéranto y trouve,

bien entendu, la place qui doit être la sienne. »

— du parti communiste (section de Boulogne/Seine) : « Pour nous, la question de l'Espéranto est partie intégrante des problèmes culturels. Il n'y a pas de progrès économique et social, de progrès national et humain sans un développement majeur de la culture. Nous ne pouvons qu'être favorables à la promotion de l'Espéranto en tant que véhicule culturel ayant sa place parmi les différents moyens de communication. »

— du parti républicain (M. Soisson) : « En ce qui concerne l'Espéranto, s'il venait au Parlement une discussion en faveur de son emploi, le P.R. n'y serait certainement pas défavorable. »

— du M.R.G. (M. Fabre) : « les Républicains de gauche sont de fermes partisans de l'Europe ; à ce titre ils encouragent les initiatives qui permettent le rapprochement des peuples. »

— de M. Gorse (député Hauts-de-Seine) : « n'étant pas moi-même espérantiste, je connais mal le problème. Mais je n'ai pas d'objection majeure au développement de cette langue et si un projet de loi venait en discussion à l'Assemblée, proposant son enseignement facultatif dans les établissements secondaires je n'y ferais pas opposition. »

— de M. Péricard (député Yvelines) : « l'Espéranto serait une aide pour la coopération entre les peuples et son enseignement devrait pouvoir être généralisé. J'émetts un avis tout à fait favorable. » Gabriel ROUGETET.

— Kiel kutime Strasburgo fratece gastigis nin en sufiĉe komforta junul-domo, kie ĉio okazis: la akcepto (virine alloga), la manĝoj (varie bongustaj), la tranoktado (iom brua), la distroj (lerte prezentitaj), la laboro (babileme agiga), la libro-aĉetado (laŭkvante bonega). Agema virinaro gvidata de vira prezidanto... multe, ne ĉiam facile, sed bonege... nin priservis:

Ĉar ok-dek Kongresanoj
Estas taskig-fontanoj,
Foras ĉiu riĉproĉo
Pro prizorga diboĉo...

Rimarkindas, ke multaj alilandanoj alkuris tiun simpatian renkontiĝon, sabat-vespere agrabligitan de la muzikaj ŝercoj kaj ŝercoj de Danielle: kiom da instrumentoj grandegaj, grandaj, grandetaĵaj, malgrandetaĵaj, malgrandegaj, eĉ ete etaj! Kia ĉarmo kaj virtuzeco! Dankon al ŝi kaj ties invitintino! Post tiu zigzaga muzik-vojaĝo tra Sud-ameriko, ni lumbilde vojaĝetis senlace (ĉar sid-bilde!) tra Alzaco. Bedaŭrinde al la Federaci-anoj, kiuj paŭtis tiun vesperon!

Ni tranoktis, matenmanĝis kaj ek! tuj al la laboro. Grava estis la tagordo kaj mi esperas nenion forgesi. Se jes... bonvolu... S-r^o ZIPFEL salutis ĉiujn kaj S-r^o COLNOT transdonis la parolon al la sekretario por la agad-raporto kaj al la kasisto por la financa raporto ambaŭ unuanime aprobitaj.

Pri LA INFORMILO, S-r^o DENIS aldonis kelkajn vortojn kaj post rapida diskuto (unufoje ne estas kutimo) la ĝenerala kunveno decidis jenon: se iu grupo, membro, servo, deziras prepari folion por la INFORMILO, ke li tiele agu: li tajpas aŭ tajpigas la tekston, multobligas kaj sendas ĝin 350-ekzemplere rekte al la redaktisto, kiu aldonos mem al nia ligilo. Tiamaniere povas naskiĝi paĝoj de junularo, paĝoj pri libro-servo k.t.p. Do ĉiu ĉe sia skrib-maŝino!

Pri la libro-servo estis unuanime decidite -krom unu kontraŭvoĉo- ke ĝi fariĝu Federacia. Tio estas granda ek-iriga paŝo por ĉiuj novuloj kaj spertuloj, kiuj trovas proksime de si, ĉiujn nuntempe haveblajn librojn. Plie tiu libro-servo, se ĉiu almenaŭ aĉetas unu libron ĉiujare (ne estas malpermesate aĉeti multe pli!), alportos bezonan monon al la Federacio.

Du rezolucioj estis unuanime akceptitaj:

1a- pri la pligrandigo de la Orient-Franca Federacio

- a/ La partoprenantoj de la 37a Kongreso de Orienta Francio estas pretaj akcepti la departementojn 51an (Marne) kaj 52an (Hte-Marne). La anoj de ĉi-tiuj departementoj havos ĉiujn rajtojn samajn je la rajtoj de la aliaj departementoj.
- b/ La partoprenantoj de la 37a Kongreso lasas la lastan decidon al la UFE-KONGRESO. (last-minute: UFE-Kongreso agnoskis la proponon... departementoj 51 kaj 52 enŝoviĝas de nun en la Federacion).

c/ Poste, kiam la supre menciitaj departementoj havos sufiĉe mult-nombrajn esperantistojn pretajn kuniĝi, ili povos denove starigi novan propran Federacion.

2a- Pri la akurateco de la UFE-demandoj

La partoprenantoj de la 37a Kongreso de Orienta Federacio postulas, por eviti novajn miskomprenojn kun la estraro de UFE, ke la demandoj alvenu sufiĉe frue (almenaŭ fine de oktobro)

Tiamaniere la demandoj povos plene trafe respondi.

Okazis priparolado pri la urbaj grupoj:

En METZ bone funkcias junulara klubo po 7 horoj ĉiusemajne kaj plenkreskula klubo po 4 horoj ankaŭ ĉiusemajne: grava laboro sendube baldaŭ efika. Estas notinde, ke la klubanoj tradukas artikolojn el la esperanto-jurnaloj kaj aperigas ilin en lica bulteno. Plie ili nun travojaĝas la libron "PAŜOJ AL PLENA POSEDO"

En MULHOUSE okazas regulaj ĉiumonataj kunvenoj.

En MUNSTER daŭras kurso kun 10 gelernantoj: jen granda espero por la venonta lerneja jaro.

En NANCY, la liceo Georges De La Tour ĉeestis la naskiĝon de nova esperanto-kurso kun senduba ebleco de porinstruista kurso. Plie daŭre funkcias la unua-, dua- kaj tria-grada kursoj perkorespondaj. Baldaŭ aperos denove la prospektoj de la nacia turisma oficejo.

En BAR-le-DUC, urbo de LA INFORMILO, agadis pluraj eksterlandaj prelegistoj. Kial do aliaj urboj ne akceptas ilin? La kostoj estas malaltaj kaj la rezultoj netakseblaj. Ke ĉiu urbo aliĝu al tiu reto de la esperanto-vojaĝantoj petante informojn de UFE

En SAINT-DIE okazis esperanto-ekspozicio, 13 personoj aliĝis al la perkoresponda kurso, la grupo enhavas 22 membrojn kaj el ili 10 vizitas la Federacian Kongreson.

En STRASBOURG regule kunvenas la esperantistoj. Ĉi-jare ili preparis (bonege) nian kongreson. Plie kadre de la universitato de la "tria aĝo" nun aŭdiĝas la Zamenhoĝa lingvo kaj ni ne forgesu la 10 perkorespondajn lernantojn.

En TOUL 12 personoj lernas, ĉefe geknaboj.

En THONVILLE estas vizititaj la lernejoj kaj informitaj la loĝantoj, do baldaŭ ekfloros novaj buntaj bukedoj!

Ĉu ĉi-tiu jaro estis bona? Tut-certe jes!

Kaj nun estis elektitaj komitatanoj: denove DEGRELLE kaj GROSSMANN, unuafoje LONGUE-EPEE.

Fine ni prilaboris la UFE-raportojn: la agad-raporto, la financa raporto kaj la budĝeto estis ĉiuj tri grand-kvante akceptitaj. Ni voĉdonis por la renovigo de la nacia konsilio kaj kaj fine ni deligitinis S-inojn GRAMP kaj... aŭ NOURMONT-MOON ĉe la nacia kongreso en CLERMONT-FERRAND.

Ĉu restis io por fari, ĉu restis iuj?

Jes, tuj poste ĉiuj aliris la honorvinon Strasburg-maniere "kukigitan" antaŭ ol en-restoraci-iri por gustumi (almenaŭ sufiĉe pluraj) la saŭr-kraŭton.

Kaj post-tagmeze dum kongresanoj vizitis la urbon, la "enkarcerigitaj" komitatanoj renovigis la estraron jene:

Prezidanto:	Sr ^o COLNOT
Vic-Prezidanto:	Sr ^o LIENHARDT
Sekretario:	Sr ^o DEGRELLE
Help-sekretario:	Sr ^o LONGUE-EPEE
Kasisto:	Sr ^o GROSSMANN
Redaktisto:	Sr ^o DENIS
Membroj:	senŝanĝaj

Oni devos iufoje pritrakti la respondecon pri la perkoresponda kurso kaj perĵurnala informado.

La komitato decidis kunveni la 25an de marto 1879, do unu monaton antaŭ la kongreso, kiu okazos regione de COLMAR, zorge de Sr^o CUENE.

Roger DEGRELLE



— Antaŭ la balotoj ni dissendis cirkuleron al ĉirkaŭ 40 aktivuloj en nia regiono, por inciti ilin, ke ĉiu skribu al kandidatoj en sia distrikto.

Pozitive reagis al tiu al voko la jenaj personoj, kiun ni deziras danki:

S-r^o DE ZILAH kaj S-in^o NAU (METZ), S-r^o GUEGUENIAT (SELESTAT), S-r^o LUDWIG (MÜNSTER), S-r^o CUENE (COLMAR), S-r^o MATSCHEK (VERDUN), S-roj LIENHARDT kaj GROSSMANN (MULHOUSE), S-in^o MULLER (STRASBOURG), S-r^o GRENIER (TOUL), S-in^o HAUSER en VANDOEUVRE.

Ni ricevis ĉirkaŭ 20 respondojn. El ili gravas la jenaj favoraj: S-in^o Alice SAUNIER-SEIT (Ministrino de la Universitatoj), kies promesojn vi povos legi sur la 2a paĝo de la revuo, S-r^o Jean-Louis MASSON, deputito de METZ (RPR), Generalo BIGEARD deputito de TOUL.

Vi scias, ke 228 deputitoj de la antaŭa parlamento deklaris sin favoraj al E^o Estus necese nun re-aktivigi ilin kaj la freŝ-bakitajn! Bonvolu nepre antaŭ ol agi informi min pri viaj intencoj, por eviti laŭeble duobligi leterojn aŭ mispaŝojn.

JP COLNOT

en METZ★

... "Sukcese plenumiĝis dum marto la stariĝo de la "Esperanto-Klubo de Messo". Aliĝis 21 klubanoj plus ni tri: F-in^o GIUMMELLY, mia edzino kaj mi-mem. Estas 2 kursoj ĉiuvendrede, la unua de la 18a30 ĝis 20a30, la 2a de 20a30 ĝis 22a30. Ni triope animas la kursojn. Krome F-in^o Giummelly estas la respondulino de la E^o-Klubo je la Junuldomo (Kultur-Domo). Ĉiuj klubanoj (krom unu) aliĝis al la Orienta Federacio kaj abonis la Informilon, kiam membro de la familio ne abonas ĝin.

En nia kazo, la prelego pri E^o sekvata de la komenco de unua-grada kurso ŝajnas la plej bona maniero por varbado. Mi volas diri, ke ĉiuj niaj lastaj rezultoj fontis de la staĝoj en NANCIO..."

el letero de S-r^o DE ZILAH

PERKORESPONDA KURSO★

Ni respondis ĝis nun al 160 inform-petoj. 62 gelernantoj nun aliĝis al la kurso. Kelkaj baldaŭ fin-lernos la kurson, deko ĉeestos la junian staĝon en NANCY. Pluraj el la pasinta jaro daŭre lernas; ĵus fin-lernis S-in^o DENGREVILLE (51 SERMAIZE) gvidita de S-r^o REMY (70 LUXEUIL) Gratulojn!

PLIA KURSO EN OBERNAI (67)★

En kolegio "Eŭropo", S-r^o Bernard AUNIS, instruisto pri franca lingvo, malfermis kurseton per la Junulkurso, antaŭ kelkaj monatoj. La gelernantoj atingis jam la duan parton de la kurso kaj 4 el ili ĉeestus kun sia instruisto la staĝon en NANCY

STAĜOJ DE PAROLATA ESPERANTO EN NANCY★

Kiam vi ricevos ĉi-tiun Informilon la 7a staĝo de parolata E^o estos verŝajne jam okazinta la 17/18ajn de junio. Ĝis mezo de majo aliĝis 33 personoj, oni rajtas do antaŭvidi 50 partoprenontojn.

La 8a staĝo okazos en NANCY la 9an kaj 10an de decembro. Jam nun rezervu tiun daton! Novaĵo estos, ke la talenta svisa instruisto kaj kantisto Olivier TZAUT, el La Chaux-de-Fonds, gvidos en tiu staĝo la kurson B kaj vespere li animos kabaredon samtempe por esperantistoj kaj por franc-lingva publiko de la Junul-domo, kantante alterne france kaj en esperanto. Kompleta programo aperos en la venonta oktobra n^o de LA INFORMILO.

 KULTURAJ SEMAJN-FINOJ EN SARLANDO ★

La 11a Kultura Semajn-fino en kastelo Junkerwald sukcese okazis la 5-7ajn de majo Ĉeestis pli ol 40 personoj el Britio, Luksemburgio, Germanio, Francio. Gvidis kursojn Pastro Hansjörg Kindler (Luksemburgo) kaj Olivier Tzaut. Prelegis pri "enkonduko en la stilistikon de Esperanto" profesoro Reto Rossetti el Stoke on Trent, Anglio.

Okazis katolika di-servo, vin-gustumado aranĝita de Anton Kieffer, dum kiu prelegis pastro Kindler, kantado far Olivier Tzaut. Entute tre agrabla okazintaĵo, spite al malfavora vetero.

La 12a Semajnfino okazos samloke de la 29a de septembro ĝis la 1a de oktobro. Notu tiun daton. Oni jam scias, ke prelegos D-r° TAZIO CARLEVARO (Neufchâtel) pri la "historio de IDO".

 KONGRESO DE AMIKECO ★

Organizata de S-r° P. DELAIRE (Centre National Esperanto-Office) kun kunlaboro de S-r° KINDLER, tiu kongreso okazos en Luksemburgo de la 13a ĝis la 17a de julio. Nur parta partopreno eblas. Kotizo 35F, kompleta pensio 60-70 francaj frankoj. Ĉiutage ekskursoj, vesperaj kunvenoj, ktp. Por pliaj informoj skribu al S-r° Delaire CNEO BP 2002 45010 ORLEANS-CEDEX

 EĤOJ EL PASINTAJ RENKONTIĜOJ ★

BAZELO... Tio disvolviĝis dum la semajn-fino de la 15/16aj de oktobro 1977 la program-riĉa tri-landa renkontiĝo. Partoprenis 55 geesperantistoj el ok landoj! S-r° RÖLLINGER prelegis en moderna esperanto pri "Originoj de Kulturo" montrante samtempe tretrafajn kaj interesajn diapozitivojn. Ni mense saltis tra jar-dekmiloj, dum kiuj evoluis diversaj kulturoj, kiel ekzemple en Mezopotamio, Egiptio, Kreto, Grekio kaj en aliaj kontinentoj. Post la vesper-manĝo oni povis spekti kelkajn skeĉojn kaj kantojn de la ensemblo "La Vagabondoj".

Dimanĉe matene S-r° RÖLLINGER ree prelegis, ĉi-foje pri la temo "Orientaj aspektoj de la Okcidento, kaj refoje la diapozitivoj kaptis la atenton de la ĉeestantoj. La ekspansio de la Islamo fariĝis vastega de Afganio ĝis Hispanio. Ĝi influis la okcidentan kulturon per multaj trajtoj. Eĉ nia lingvo havas arab-devenajn vortojn: sofo, pantoflo, ŝalo, karafo, matraco, ktp. Entute estis entuziasmiga lum-bild-prelego. Fine, S-in° Döring, prezidantino de la Bazela Grupo, proponis, ke tiu-ĉi tri-landa renkontiĝo okazu ĉiujn du jarojn, en unu el la tri landoj. En Germanio do dum 1979 kaj en 1981 en Francio.

André GROSSMANN

*-----**
 HOHRITT... Jen la "urbeto" de la SOGELA-tago de la 8-9ajn de oktobro en moderna feriejo kuŝanta en la nigra arbaro, "tago" organizita de E°-grupo Oberkirch. Partoprenis 50 personoj el Francio, Jugoslavio, Nederlando kaj diversaj regionoj de FR Germanio.

Dum la ĉef-kunveno de SOGELO (Su-okcidenta Germana Esperanto Ligo) estis elektita nova estraro: prezidanto Richard REUCHLIN, vic-prezidanto Johannes RADAM, sekretario E.W. MATTHES, ĉiuj elMANNHEIM. Ĉar delonge nia Federacio plej amike rilatas kun ili, ni kun tute speciala ĝojo deziras gratuli ilin!

En la programo de la renkontiĝo, S-r° POPPECK prezentis majstre aranĝitan muntaĵon "Super la nuboj el la Nord-orienta Eŭropo". S-in° BORMANN raportis diapozitive pri la UK en Rejkjaviko, S-r° HEISS prelegis pri E° kaj filatelio, S-r° HAUPENTHAL pri la verkaro de R. SCHWARTZ

----- *

UNU MONATO EN POLLANDO...

..malfacilas priskribi la tutan vojaĝon kaj travivaĵojn!

Unue mi parolos pri la gastemeco de la Poloj: estis vera plezuro. Ĉie ni (jes ni, ĉar kun mi vojaĝis Dominiko, 14jara) renkontis afablecon, akceptemon, ĉiujn sciigojn kaj necesajn helpojn. Eĉ dum-nokte kiam mankis benzino, homoj tuj pretis por trovi ĝin alporti ĝin kaj ĉiufoje kun ĝojega rideto.

Due mi diros, ke ne ĉiuj esperantistoj flue aŭ ofte parolas en esperanto. Tio estas bone konata, kaj ne nur en Pol-lando, sed tio estas malbona afero por esperanto! Kiam do la esperantistoj vere kredos je sia taŭga ilo por paroli, ŝerci, diskuti, vojaĝi, helpi, doni kaj ricevi ĝojon, amon, labori por la konkordo kaj la paco!

Tie mi malkovris landon, ku pli kaj pli moderniĝas (ekzemple mi vidis aviadilon kaj Helikopteron semi sterkon por la kreskaĵoj), kie videbliĝas la viv-ĝojo, kie la kulturo estas la ĉies afero. Jes, ne ĉio estas solvita, sed multo estas bone zorgita.

Plurfoje kun Dominiko ni havis okazon por propagandi esperanton. Eĉ unufoje ni estis intervjuataj de geknaboj kaj plenkreskuloj pri Francio kaj ties lernejoj, pri francaj kantoj kaj esperanto. Dum unu monato ni parolis nur en E-^o, E-^o estis vere nia ĉiutaga lingvo kaj mi devas konfesi, ke la junulo multe pli bone parolis ol kelkaj aliaj plenkreskuloj, eĉ respondeculoj en la esperanto-movado.

Tamen ĝojigis nin la fakto, ke ni partoprenis en katolika kongreso, kiu arigis pli ol 700 ĉeestantojn kaj ni iomete fieris, pro la fakto, ke mi havis la honoron prediki, en esperanto kompreneble, antaŭ 3 episkopoj, almenaŭ 50 pastroj kaj 500 fideluloj. Kiam tio okazos en Francio?

Fine, bona kongreso, bona propagando. Dankon al vi, karaj Poloj, kaj ĝis !!

Roger DEGRELLE

----- ★

INTERNACIA ESPERANTO-KLUBO AUTOMOBILISTA

I.E.K.A. posedis dum 1977 1088 membrojn... Ĉar vi estas samtempe aŭtomobilisto kaj esperanto-parolanto... nepre aliĝu! Dumviva kotizo kostas nur 3 US-dolarojn!

Inter la lastaj atingoj de la klubo ni menciis la starigitan reton de deĵorantoj survoje al la Kongreso de VARNA... kiuj pretas helpi al vi okaze de via vojaĝo tien!

Turnu vin la la Sekretario: S-r^o Jean GUILLAUME, 66 de Grasse Village 78810 FEUCHE-ROLLES

----- ★

NI REIRU DE TEMPO AL TEMPO AL LA LINGVO-FONTO!...

Montriĝas necese reagi kontraŭ la uzo relative ofta de certaj derivaĵoj adjektivaj kaj adverbaj de la vorto "ESPERANTO". Fakte, estas nepre malrekomendinde uzi es-primon kiel "esperanta literaturo" anstataŭ "Esperanto-literaturo", aŭ "esperantaj asocioj" (ĉu temas pri "asocioj, kiuj esperas"??) anstataŭ ESPERANTO-ASOCIOJ, "paroli esperante" (esperante pri kio?) anstataŭ ... paroli en Esperanto, k.a.

Oni ne forgesu, ke "Esperanto" (skribota kun majuskla komenc-litero) estas nomo. (Vidu la Plenan Vortaron!) Anstataŭ uzi la ne-oportunajn derivaĵojn "esperanta", "esperantaj", ktp, ni uzu taŭgajn vort-kunmetojn kiel "UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO", "Fervoĵista Esperanto-Kongreso", "Esperanto-Grupo en Lyon", ktp.

En certaj kazoj, povas esti preferinde uzi taŭgajn prepoziciojn, kiel "Heroldo de Esperanto", "gvidiloj en Esperanto", "korespondado per Esperanto"

A. LIENHARDT

Ni bonvole sciigas al niaj legantoj, ke ĵus aperis ekster-ordinara traktaĵo, verkita de S-r^o LIENHARDT, sub la titolo:

----- "OPTIMALA ORTOGRAFIO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO" -----

"..Tiu grava kaj detala traktaĵo montras kiel for-igi la obstaklon, kiu estas la kaŭzo ke, ĝis nun, Esperanto ne atingis vastan tut-mondan uzadon nek oficialan agnoskon fare de la ŝtataj aŭtoritatoj.

dank' al la "optimala ortografio", kiu ebligas skribi, tajpi, teletajpi, telegrafi, televidigi, komposti, presi kaj komputeri ĉiujn ajn vortojn, sciencajn terminojn kaj nomojn, nia lingvo pli facile gajnos la intereson kaj simpatiecon de la intelekta kaj politika elito de ĉiuj nacioj. Tio estas la nepra kondiĉo, por sukcesigi la leĝo-proponojn prezentatajn al parlamentoj kaj registaroj divers-landaj, favore al ĝenerala instruado de Esperanto en la lernejoj kaj universitatoj."

A. L.

Prezode la verko (126-paĝa), afrankite: 19,50 francaj frankoj aŭ 4 usonaj dolaroj. Oni bonvolu pagi per banka ĉeko al la aŭtoro (24 av. de Riedisheim, 68100 MULHOUSE) aŭ per ĝiro al la poŝta konto n° 16 233 37 PARIS de Ligue Française "PRO UNESCO"

La traktaĵo estas mendebla ankaŭ ĉe la libro-servo de UEA en ROTTERDAM, kaj ĉe la kasisto de nia Federacio, S-r° A. GROSSMANN (ĝiro banka aŭ poŝta al la konto de la Federacio)

UNE "DEMYTHIFICATION" QUI S'IMPOSE ! ! . . .

.. " L'ANGLAIS, LANGUE INTERNATIONALE " .. (?)

Quel espérantiste n'a-t-il jamais entendu dire: "A quoi bon l'Espéranto, puisque l'anglais est parlé dans tous les pays et que, grâce à lui, on arrive toujours à se débrouiller!"

C'est là en effet une légende qui, comme bien des légendes, n'est pas totalement dépourvue de fondement: en occident par exemple, la classe aisée se débrouille assez pour répandre l'illusion qu'il en va de même pour tous, et son illusion se répand tout comme se répandent ses modes, ses goûtes, ses habitudes, son parler. En fait le voyageur qui s'écarte un tant soit peu des grands hôtels, des grands axes de communication, pour prendre contact avec la vie authentique, apprend vite qu'il est indispensable de savoir la langue du pays.

Egaré entre les lacs et les canaux de Hollande avec la sottise idée que l'anglais ou l'allemand devraient normalement le tirer d'affaire, l'auteur de ces lignes dut constater à ses dépens que les nombreuses personnes interrogées avaient omis d'apprendre ces langues... ou de les retenir. Car s'il est vrai que beaucoup d'euro-péens apprennent l'anglais, l'important n'est pas ceux qui apprennent, mais CEUX QUI SAVENT! On croit l'anglais largement répandu parce qu'il est largement enseigné ... MAIS ON OUBLIE QU'IL EST RAREMENT SU!

C'est pourtant l'évidence et la réalité.

Demandez à nos anglicistes CE QU'ILS COMPRENENT des chansons anglo-américaines que la radio diffuse d'abondance: aucun d'entre eux ne les comprend et pourtant l'omniprésence de ses mélodies sur les ondes crée l'illusion que l'anglais est partout.

Alors il convient de bien distinguer: il est exact que la civilisation anglo-saxonne pénètre à ce point la nôtre que nous en sommes parfois réduits à adopter les mots anglais pour désigner les objets et des habitudes nouvelles; mais le résultat linguistique de cette pénétration, c'est le FRANGLAIS... et non l'ANGLAIS! Chacun sait ce qu'est un week-end, un gadget, un match, et pourtant combien de ceux-là parlent-ils l'anglais? Bien peu évidemment, et cela prouve simplement que les civilisations, les modes de vie, les comportements, s'acquièrent beaucoup plus facilement que les langues. Aussi, quand nous disons que l'anglais est répandu, nous voulons seulement "rendre hommage" à l'influence anglo-américaine dans le monde, rendre leur dû à ses manifestations extra-linguistiques, reconnaître sa prépondérance dans tous les domaines de l'activité. Mais nous ne voulons pas dire que LA LANGUE ANGLAISE EST REPANDUE! Nous transférons ainsi à la langue une qualité qui appartient davantage à la civilisation.

P. JANTON

(à suivre)

Pledo por Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla

A. Konstato. Kiam oni legas atente, kvazaŭ kun okuloj de novulo, la diversajn Esperanto-eldonajn aperintajn en la lastaj dudek jaroj, oni faras la jenan pri-pensigan konstaton: la Internacia Lingvo kreske pliriĉiĝas kaj pliampleksiĝas; sed, samtempe, ĝi fariĝas pli kaj pli komplika kaj malfacila.

Tiu evoluo minacas la disvastigon de Esperanto en malaltaj kaj mezaj socitavoloj ĉiulandaj. Estas sendube, ke ĉiuj lernantoj, ĉiuj novaj — kaj miloj da malnovaj — adeptoj de nia lingvo aspiras legi tekstojn en *Esperanto simpla kaj facila*. Bedaŭrinde, ne aperas sufiĉe da eldonajoj, kiuj kontentigas tiun postulon plene kaj ĉiurilate. Altrudiĝas la irapreso, ke certaj aŭtoroj kaj redaktoroj sidas en „ebura turo”, kaj verkadas nur por si mem, pro privata plezuro, pro intelekta ĝuo, aŭ pro literatura ambicio. Ŝajnas, ke ili tute ne pensas pri la kompatinduloj, kiuj legos iliajn produktojn, nek pri la esenca celo de nia lingvo: ebligi, al multmilionoj da homoj ne super-instruitaj, facile interkompreniĝi en la tuta mondo.

Ĉu estas mirige en tiuj cirkonstancoj, ke amaso da kursanoj kaj memlernantoj baldaŭ perdas siajn iluziojn pri la onidira facileco de Esperanto? Ĉu estas mirige, ke, pro la sama kialo, multaj novaj (kaj ankau malnovaj) membroj iom-post-iom seninteresiĝas pri nia afero, kaj forlasas nian movadon?

B. Rimedo. Estas nepre necese ŝanĝi tiun alarman situacion radikale kaj definitive. Por atingi tiun rezultaton, ĉiu celskonscia Esperanto-uzanto devos libervole adopti la jenan sindevigon: *Skribante aŭ prelegante, mi ĉiam klopodos respekti, kiel eble plej strikte, la „bazajn kriteriojn de Esperanto laŭeble simpla”*. Tiuj kriterioj estas formuleblaj jene:

1) Uzi lingvo-stilon *malkomplikitan*, kun frazoj kiel eble plej mallongaj; longegaj frazoj enuigas, tedas kaj fortimigas. (Konsultu la modelan gvidilon por akiri bonan Esperanto-stilon: „Ne tiel, sed tiel ĉi!” de F. Faulhaber!);

2) uzi prefere vortojn *kutimajn* kaj dir-manierojn *familiarajn*, kiajn oni bezonas en la ĉiutaga vivo;

3) eviti, en ne-fakaj tekstoj, neologismojn kaj maloftajn fak-terminojn; ekz. oni prefere uzu „ter-tremo” anst. „sismo”, „pulmo-inflamo” anst. „pneŭmonio”, k.s.;

4)

5) eviti maiklarajn aŭ pezajn vortkunmetojn (ekz.: pagadmono, provovojaĝoj, pasagerelirejo, malvarmummaisanoj); uzu prefere esprimojn tuj kompreneblajn, ekz.: „desegnaĵoj pri infanoj”, „desegnaĵoj por infanoj”, „desegnaĵoj de (t.e. apartenantaj al) infanoj”, respektive „desegnaĵoj fare de (t.e. faritaj de) infanoj”, anstataŭ „infan-desegnaĵoj”;

6) uzi divid-strekon en du-radikaj kaj pli-ol-du-radikaj vort-kunmetoj, por ke ili estu pli facile ekkoneblaj. (Vidu Plena Gramatiko 1938, § 411!);

7) eviti laŭeble la elizion de la finaĵo -o en vort-kunmetoj. Tiu regulo senteble plifaciligas la prononcon en multaj ka-

zoj: ekz. fiŝo-supo anst. fiŝsupo; ment-teo anst. mentteo; k.s. Krome, ĝi ebligas ĝuste aŭdigi la ĉef- kaj flank-akcenton; ekzemple *suno-varmo* kiel *suna varmo* (ne *sunvarmo* kiel *ĝendarmo*); (Vidu P.G. § 4 kaj 5!);

8) ĝuste uzi la divid-strekon ĉe liniofino (por transporti parton de vorto, pro loko-manko, en la sekvantajn liniojn), dividante la vort-kunmetojn laŭ iliaj partoj gramatikaj; ekzemple *rid-inda* (ne *ridinda!*), *pasport-oficejo* (ne *pasporto-ficejo!*); (Vidu P.G. § 412!);

9) uzi la akuzativon nur tiam, kiam ĝi estas nepre necesa, t.e. en rektaj komplementoj, kaj por indiki direkton. Tio inkluzivas eviti ne-necesan anstataŭigon de certaj prepozicioj per akuzativo; estas preferinde skribi „memoru pri tio!” anst. „memoru tion!”, aŭ „restu dum du tagoj” anst. „restu du tagojn”, k.s.;

10) uzi malavare interpunkciajn signojn, por montri, kie la leganto aŭ prelegantoj iomete haltu, por fari mallongan „spiro-paŭzon”. Abunda interpunkcio konsiderinde faciligas al novuloj klare distingi la frazo-partojn; same, ĝi plifaciligas al aŭskultantoj kompreni la sencan de frazoj parolataj. (Komparu, ekz., la du frazojn sam-vortajn, sed malsamsencajn: „La knabo petis ĉokoladon, mangante pecon da pano” kaj „La knabo petis, ĉokoladon mangante, pecon da pano”. (Vidu P.G. § 403!)).

Al tiuj dek „bazaj kriterioj”, jam formuleblaj aliloke („*Esperanto*” p-ro 764 p. 116), oni povas aldoni ankoraŭ du:

11) adopti, en prepozicioj, la naturan sinsekvon „subjekto — verbo — komplemento”; ekzemple „La tigo mordis la krokodilon” anst. „La krokodilon mordis la tigo”;

12) eviti laŭeble la substantivigon de verbo por esprimi agon; ekzemple, oni skribu „Ni laboras por plenumi la taskon” anst. „Ni laboras je la plenumo de la tasko”.

C. Realigo. Se estas ne tre malfacile adopti la ĉi supran principon, eble estas malpli facile respekti ĝin sen-interrompe kaj strikt-maniere. Tial oni kontrolu siajn manuskriptojn plurfoje kaj sufiĉe rigore. Krome, estas rekomendinde kontroli ĝin, antaŭ publikigo, fare de almenaŭ unu spertulo.

La subskribinto sugestas krei Landajn Lingvo-Komitatojn (LLK), kies bonvolaj membroj kontrolu manuskriptojn tiucele alsenditajn. (Interesuloj povas skribi al la jena adreso: 24 av. de Riedenheim, F-68 Mulhouse, Francujo).


Sam-cele, estus dezirinde restarigi la iaman Internacian Lingvo-Komitaton (ILK), sub la aŭspicio de la Akademio de Esperanto.

D. Fin-parolo. Eble iuj legantoj opinios, ke la skribinto de ĉi tiuj linioj estas tro postulema. Por konvinki ilin, ke oni ne povas esti tro postulema en tiu rilato, mi oportune rememorigu al ili la gravan averton de D-ro Zamenhof, forgesitan de multaj nuntempuloj:

„Ni povos venki nur, se ni zorgeme konservos al nia lingvo ĝian simplecon kaj facilecon”. (Vidu: P.V. p. 333, kol. 2, l. 10!).

Albert Lienhardt


4/ uzi pasivajn participojn nur tiam, kiam tio estas nepre necesa ekzemple, skribu: *oni konstruis la domon en 1760* aŭ *la domo konstruiĝis en 1760* anstataŭ *la domo estis konstruata -estis konstruita- en 1760*



— KRUC-VORT-ENIGMO *

HORIZONTALA

1 - religio kun unusola Dio. 2 - hispana ina antaŭnomo. instrui (radik.). 3 - alporti sian parton al komuna laboro (adverbe). 4 - ĉefurbo (fonetike). grupe. sensprite (radik.). 5 - edzino de Ch. Chaplin. rapide iri. 6 - loko kie haltas veturiloj. fervoj-stango. 7 - matematikaĵo. adverbo de malproksimeco. 8 - pelto de didelfo. pronomo. 9 - tralasiva. 10 - japana religio. ŝtonego.



VERTIKALE

1 - scienca instrumento. 2 - sonfiguro por imitado. 3 - nea prefikso (radik.). kortobirdo. ĉefurbo (fonet.). 4 - atena juĝmaniero. 5 - grundo (radik.). greka litero. sufikso. 6 - japana abrikoto. ronda plataĵo. 7 - nedifina pronomo. alta leda piedvesto (fonet.). bestego. 8 - ŝanceli aŭ malfirmigi (radik.). substanco en la urino. ido. 9 - pulvorigilo. goma substanco. 10 - akuŝo-scienca.

— "SILAB"-ENIGMO *

La unua kaj tria kolonoj legataj de supre malsupren eldonas proverbon.

a ab ak an bu ĉo e e ek elo em fe kio la li li lio lio lo me mio mo ne ni no
o o o pi po pre ra ra rn ro ro selo to vi

1	-	+	-	+	+	+	+	+	+
2	-	+	-	+	+				
3	-	+	-	+					
4	-	+	-	+	+				
5	-	+	-	+					
6	-	+	-	+	+	+			
7	-	+	-	+	+				
8	-	+	-	+	+	+			
9	-	+	-						
10	-	+	-	+	+				
11	-	+	-	+	+				
12	-	+	-	+	+				
13	-	+	-	+	+				
14	-	+	-	+	+	+	+		
15	-	+	-	+					
16	-	+	-	+	+				

ni nepre devas gardi ĝin!
grimpana vegetaĵo
nervo de l'milito
utila pik-besto
ŝnureto el kotono aŭ ledo
rekompenco
optika instrumento
meblo-stilo
rifuza
sub-brako
ĉefurbo
substanco de la elefanto-dentego
simbolo de pureco
insekto kun mallonga vivo
malofta
opozicii